

Renato Corsetti  
k. a.

# KNEDU MIN SINJORINO !

tabuaj kaj insultaj esprimoj en esperanto!



LA KANCERKLINIKOTEKO

ISSN 0398-5822

## KUNLABORIS

<u>Anne Ambles</u>	reviziis la manuskripton kaj proponis terminojn
<u>Andrew D.N. Andison</u>	eldonis liston de fi-vortoj
<u>Anna Brennan</u>	reviziis la manuskripton kaj donis konsilojn
<u>L.C. Deij</u>	kontribuis per artikolo pri onomatopeoj
<u>So Gilsu</u>	reviziis la manuskripton kaj proponis terminojn
<u>Martin Haase</u>	reviziis la manuskripton kaj proponis terminojn
<u>Boris Kolker</u>	reviziis la manuskripton kaj proponis terminojn
<u>Lorjak</u>	reviziis la manuskripton - proponis insultojn
<u>Stefan MacGill</u>	reviziis la manuskripton
<u>Remo Magnani</u>	proponis askrojn - reviziis la manuskripton
<u>Leif Gunnar Nordenstorm</u>	kontribuis per sia "Slanga Vortaro Aperos" kaj per sendado de la Raporto de la Laborgrupo pri Kompara Blasfemologio de la 15-a Internacia Seminario de GEJ kaj reviziis la manuskripton
<u>Alessandro Perna</u>	tradukis la liston de insultoj el la itala libro "Le brutte parole" kaj proponis kelkajn terminojn
<u>Norberto Saletti</u>	kontribuis per listo de terminoj ellaborita kune kun Dario Besseghini kaj Oscar Puig i Canovas
<u>Ian Wibberley</u>	sendis liston de fi-vortoj kaj proponis kelkajn el la verkoj de M. Boulton
<u>Dirk Willkommen</u>	reviziis la manuskripton kaj proponis insultojn

## ENKONDUKO

Renato CORSETTI

1. La libreto, kiun vi estas eklegantaj, estas nur provo ordigi vortojn de difinitaj specoj kaj kontroli pri la efektiva uzo de ili fare de la parolantoj de Esperanto.

Mi estus tre danka al ĉiuj legantoj, kiuj bonvolos kunlabori laŭ la instrukcioj, kiuj troviĝas fine de la enkonduko, por ke la iam eldonota dua eldono estu pli kompleta.

Ĉi tiu libreto ekestis kiel kontribuo al la tutmonda festado de la jubilea jaro: la 10-jara jubileo de LKK. Bedaŭrinde ĝi estas eldonata iom post tiu epok-fara evento, sed la spirita partopreno en la festado ne malpliĝas pro tio.

2. La komenca ideo estis redaktado de fi-vortareto. Tiun taskon jam entreprenis pluraj junaj esperantistoj en diversaj okazoj kaj landoj. Mi volis resumi ĉion okazintan kaj, se eble, aldoni ion. Dum la daŭro de la laboro prezentiĝis pluraj teoriaj problemoj, kiujn mi provizore solvis por antaŭeniri. Tio neniel signifas ke mi havas ian principan starpunkton pri miaj solvoj, sed male mi pretas ŝanĝi ilin se aperos interesa konsilo. Tiujn konsilojn mi aparte emfaze petas.

3. Mi ekkolektis fi-vortojn en Esperanto el kelkaj fontoj, kaj tuj evidentiĝis la neceso havi distingojn inter la vorto-specoj.

Sekve mi alvenis al la jenaj vorto-klasoj :

- \* insultoj vortoj uzeblaj por ofende alparoli homon aŭ ofende priskribi aĵon aŭ situacion;
- \* sakroj vortoj aŭ frazoj uzataj por esprimi sian indignon aŭ koleron aŭ similan senton, ne alparolante rekte difinitan homon;
- \* evit-esprimoj vortoj uzataj, ĝenerale pro sona simileco, por eviti diri rekte sakrojn aŭ tabuajn vortojn;
- \* interjekcioj vortoj uzataj por esprimi siajn sentojn en abrupta maniero;
- \* onomatopeoj vortoj imitantaj la sonon de difinitaj bruoj aŭ bestaj blekoj;
- \* tabuaj vortoj vortoj ĝenerale rigardataj kiel tabuaj, do ne uzeblaj en ĉiuj situacioj kaj precipe ne en formalaj situacioj;
- \* metaforoj vortoj uzataj metafore por redoni signifon malsaman rilate al tiu originala (ĉi tie estas konsiderataj nur metaforoj pri tabuaj vortoj);
- \* slangaĵoj vortoj uzataj en difinitaj medioj, ĉefe jun-esperantistaj, kun signifo malsama rilate al tiu originala;
- \* ekzemploj de kunmetitaj esprimoj Ĉar Esperanto estas tre riĉa lingvo kaj la fantazio de esperantistoj ankoraŭ pli riĉa, la eblecoj insulti aŭ sakri en Esperanto estas praktike senfinaj. Mi volis doni nur kelkajn ekzemplojn de kreiva uzo de la eblecoj kunmeti esprimojn.

4. Krome en ĉiu vorto-klaso mi renkontis plurajn problemojn pri kiuj mi diros mallonge :

#### \* insultoj

Estas evidente ke en malsamaj landoj varias la ideoj pri insultoj kaj sekve varias la vortoj uzeblaj. Dum en Danlando oni povas ofendi homon nomante lin "gado", en Italujo tio tute ne eblas, ĉar por Italoj al gado ne kunligiĝas iu ajn negativa koncepto.

Alia problemo rilatas al la grado de ofend-povo de difinitaj vortoj. Dum en Britujo la vorto "idioto" estas relative malpeza ofendo, ofte uzebla ankaŭ ŝerce, en Italujo ĝi estas tre peza insulto.

Provizore mi enprenis ĉiujn trovitajn vortojn, kiuj laŭ mia juĝo kaj laŭ la juĝo de la homoj, kiuj tralegis la manuskripton, havas almenaŭ la eblecon esti internacie kompreneblaj.

Provizore mi ne notis la gradon de ofend-povo. Do, vi trovos kaj mildajn insultetojn uzeblajn kun tro viglaj infanoj kaj insultegojn, kiujn oni uzu nur en kazo de ĝismorta malamikeco.

#### \* sakroj

Ankaŭ pri sakroj ekzistas malsamaj ideoj en malsamaj landoj. Tial ke ĝenerale temas pri vorta tabu-rompo, la sakroj dependas de la ekzistantaj tabuoj.

En kelkaj landoj religiaj sakroj (blasfemoj) estas pli uzataj, ĉar religio ankoraŭ estas tre sentata. En aliaj landoj estas pli uzataj seksaj sakroj (anglalingvaj landoj), en kelkaj aliaj landoj sakroj bazataj sur fek-vortoj (german-lingvaj landoj), ktp.

Ankaŭ pri la "forto" de sakroj nenio estas notita en ĉi tiu libreto kaj ilia internacieco estas nur provizore akceptebla.

#### \* evit-esprimoj

Evit-esprimoj ne ŝajnas abundi en Esperanto. Tio, tre verŝajne, dependas de la fakto ke insultoj kaj sakroj ne estas tre ofte efektive uzataj en parolaj situacioj, kaj do neniam naskiĝis la ebleco formi ĉi tiujn esprimojn, kiuj estas iusence "duanivelaj" rilate al la originalaj esprimoj.

#### \* interjekcioj

Estas tre nestabila parto de la vort-trezoro de la parolantoj de Esperanto. Miaj impresoj eĉ la plej efektivaj parolantoj uzas interjekciojn el sia gepatra lingvo ankaŭ en Esperanto.

#### \* onomatopeoj

Ili enestas pro simileco kaj kunligiteco kun interjekcioj. Pri ili validas pli malpli tio, kio estis dirita pri interjekcioj.

#### \* tabuaj vortoj

Ĉe la bazo kaj de insultoj kaj de sakroj estas en multaj landoj (almenaŭ eŭropaj) tabuaj vortoj, kiuj apartenas plejofte al la fika kaj al la feka fak-vortaro.

Tute evidente tabuoj ŝanĝiĝas laŭ la tempo, laŭ la landoj kaj ofte laŭ la generacioj. Ĉi tie mi listigis ĉion, kion mi trovis, kaj la tuto respegulas ĉefe okcidenteŭropajn ideojn pri tabuoj.

Tre verŝajne multaj el vi ne sentos tabuecon en difinita vorto, aŭ trovos mankojn.

Ankaŭ ĉi-kaze la vortoj setus listigeblaj (sed ne estas listigataj en ĉi tiu libreto) laŭ kreskanta tabueco (ne-direbla al iu ajn, ne-direbla al pli respektindaj homoj, direbla al siaj samaĝaj ge-amikoj, direbla al kuracistoj, ktp.).

Fine, pro temo-simileco, mi enprenis ankaŭ ĉiujn vortojn priskribantajn tabuajn aĵojn aŭ agojn sed havantajn sciencon uzon.

#### \* metaforoj

La tabuaj vortoj ofte estas dirataj per aliaj vortoj, tio estas metafore. Pro tio troviĝas ĉi tie metaforoj pri vortoj, kiujn oni trovas inter tiuj tabuaj.

### \* slangaĵoj

Slangaĵoj evidente limas kun ĉiuj ĉi-supraj kategorioj. Ofte estas tre malfacile decidi ĉu temas pri metaforo aŭ pri slangaĵo.

Unu el la ĉefaj problemoj en ĉi tiu branĉo estas decidi kio estas slangaĵo kaj kio jam eniris la normalan lingvon. "Krokodili" estas la plej tipa ekzemplo de sukcesa slangaĵo, kiu eniris la normalan Esperanton. Ĉiu-kaze mi decidis enmeti ĉion, lasante al posta fazo la eventualan sarkadon. Komprenoble ankaŭ slangaĵoj estas tre nestabila parto de kiu ajn lingvo. Mi klopodis enmeti nur slangaĵojn kun iom da historio, kaj ne nur ion, kio estis uzata nur dum la lasta IJK aŭ IS.

5. Ekzistas krome kelkaj pli ĝeneralaj problemoj :

### \* Internacieco

La enhavo de ĉi tiu libreto ĉefe rezultas el la cerbumado de kelkaj italoj, francoj, germanoj kaj britoj. Nomi tion "internacia" estas kiel nomi Esperanto-revuojn revuoj.

Malgraŭ intensaj klopodoj ne estis eble malkovri la ideojn de, ekzemple, japanoj pri la pritraktitaj temoj. Tio ne signifas ke malkovrinte tiujn ideojn ni sukcesus redoni ilin en Esperanto, sed almenaŭ ni povus preni ilin en konsidero.

Pro tio vi, ĉefe se vi estas ekstereŭropano, bonvolu kunlabori por la dua eldono.

### \* Efektiva uzo

Esperanto troviĝas en stranga situacio. Unuflanke abundas verkistoj kaj libroj, aliflanke malabundus efektivaj uzantoj, kiuj parolas la lingvon almenaŭ kelkajn horojn ĉiutage por ĉiutagaj bezonoj.

Tio speguliĝas en la vortaroj, kiuj ofte donas prioritaton al verkistoj pli ol al veraj parolantoj. Pro tio oni listigas vortojn, kiuj estas uzataj nur de unu verkisto sed de neniu vera parolanto.

Ŝajnas al mi ke estas tempo doni pli da graveco al la parolantoj (kiel oni faras en nacilingvaj vortaroj) ol al la proponoj de verkistoj.

Pro tio mi notis per \* ("efektive uzata") ĉiun esprimon, kiun mi per miaj propraj oreloj aŭdis de almenaŭ du parolantoj en normala parolado (temas pri vere minimuma postulo). Ĉio cetera estas rigardinda kiel propono eĉ se ĝi venas de Zamenhof mem.

### \* Kontraŭfundamentaj Vortoj

Mi ne akceptis esprimojn, kiuj iel ne kongruas kun la fundamentaj reguloj de Esperanto (vortoj kun duoblaj konsonantoj, substantivoj finiĝantaj per "a", kaj simile) aŭ kun la fundamenta vortprovizo (aliaj radikoj por tute regule uzataj mal-vortoj, kaj simile).

Tio en kelkaj kazoj havas strangan rezulton, en la senco ke mi forigas aŭ malrekomendas regule uzatan vorton, kiun mi ne ŝatas surbaze de la ĉi-supraj konsideroj. Neŭtraleco kaj objektiveco ne ekzistas (krom en la statuto de UEA). Gravas konscii pri tio kaj ne deklari la malon.

### \* Naciaj variaĵoj de Esperanto

Ĉefe en ĉi tiu kampo, kie la vortprovizo estas malstabila, ekzistas en la reala uzo inter samlingvaj esperantistoj amaso da esprimoj, kiuj estas rektaj tradukoj el nacilingvaj esprimoj.

La parolantoj mem konscias ke temas pri neinternaciaj esprimoj, kaj ili uzas ilin nur inter si. Ekzemple : inter italoj direblas sen timo pri miskomprenoj "tranĉi la ŝnuron", inter katalunoj oni povas "foti la kampon", ktp.

Tiujn esprimojn principe mi forigis, sed evidente pluraj el la internacie uzataj estas pli sukcesaj tradukoj el nacilingvaj originaloj.

6. Se vi volas kunlabori, kaj tion mi esperas, bonvolu informi min (Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italujo) pri vortoj, kiuj laŭ vi devus enesti sed ne enestas. Temu pri vortoj apartenantaj al unu el la supre menciitaj kategorioj, kiujn vi aŭdis per viaj propraj oreloj uzi de almenaŭ du esperantistoj - el malsamaj landoj inter si kaj rilate al vi - en normala interparolado. Bonvolu ne sendi viajn proprajn proponojn nek materialon, kiun vi trovis en libroj. Komprenoble mi volonte legus ankaŭ teoriajn kritikojn pri la tuto. Dankon.

LISTO DE MALLONGIGOJ UZITAJ

AA	Anne Ambles, Francujo
ADA	Atanas D. Atanasov, Bulgarujo
And	Andrew D.N. Andison, Britujo
Boul	Marjorie Boulton, Britujo
ChLa	Christian Lauridsen, Danujo
CO	Centra Oficejo de UEA
Deij	L.C. Deij, Nederlando
IS15	Raporto pri la laborgrupo "Kompara Blasfemologio"
LaRa	Junulara grupo "La Ranetoj", Svedujo
Leiz	Izrael Leizerowicz ( <u>El la verda biblio</u> , HEA 1978)
LePu	Jacques Le Puil, Francujo
LKK	La Kancerkliniko
Lorj	Lorjak, Francujo
KN	Kial ne ?, Festa numero
Kol	Boris Kolker, Soveta Unio
Kon	Kontakto
Magn	Remo Magnani, Francujo
MH	Martin Haase, FRG
Nik	Niklas Gustafsson, Svedujo
Nord	Leif Gunnar Nordenstorm, Svedujo
PIV	Plena Ilustrita Vortaro
PAG	Plena Analiza Gramatiko
Sal	Norberto Saletti, Italujo
Simo	Simo Milojevic, Nederlando
SMG	Stefan MacGill, Hungarujo
SO	So Gilsu, Koreujo
ToJ	Tomas Jansson, Svedujo
Zam	L.L. Zamenhof
Weid	Didi Weidemann, Svisujo
Well	J.C. Wells, Britujo
Will	Dirk Willkommen, FRG

ĈEFAK VERKOJ KONSULTITAJ

<u>Atanasov, A.D.</u>	Interjekcioj kaj onomato-peoj en Esperanto, en <u>La lingva esenco de Esperanto</u> . Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo 1983.
<u>Deij, L.C.</u>	Kiel blekas la hundeto, en "Malgranda Revuo", numero neindikita
<u>Galli de' Paratesi, N.</u>	Le brutte parole, Arnoldo Mondadori Editore, Milano 1973
<u>Grosjean-Maupin, E. kaj aliaj</u>	Plena Vortaro de Esperanto. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo 1934
<u>Nordenstorm, L.G.</u>	Materialo por Slanga Vortaro de Esperanto I kaj Materialo por Slanga Vortaro de Esperanto II, el la revuo Ktp. (eldonita de Sveda Junulara Esperantista Unuiĝo), 35/1982 kaj 37/1982
<u>Schumacher, W.</u>	Raporto pri la laborgrupo "Kompara Blasfemologio", raporto multobligita prezentita okaze de la 15-a Internacia Seminario de GEJ, Hamburgo 1971 12 27 - 1972 01 03
<u>Warengnien, G.</u>	Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo 1977.

INSULTOJ

<u>abomena</u>	Insulta adjektivo pro abomenemo, ofte = abomeninda *	<u>avarulo</u>	kontraŭ homo pro troa ŝparemo *
<u>abomeni</u>	malamegi pro fizike aŭ morale naŭzaj ecoj *	<u>avida</u>	insulta adjektivo pro forta deziro ricevi aŭ posedi ion *
<u>abomeninda</u>	insulta adjektivo pro naŭzaj ecoj *	<u>avidulo</u>	kontraŭ homo pro avideco *
<u>abomenindaĵo</u>	insulta priskribo pro naŭzaj ecoj de io *	<u>azena</u>	insulta adjektivo pro stulteco *
<u>abomenindulo</u>	kontraŭ homo pro fizikaj aŭ moralaj naŭzaj ecoj *	<u>azenaĵo</u>	insulta priskribo pro stulteco de ago aŭ aĵo *
<u>absurda</u>	insulta adjektivo pro kontraŭeco al la komuna saĝo *	<u>azeno</u>	kontraŭ homo pro stulteco *
<u>absurdaĵo</u>	insulta priskribo pro strangeco de io *	<u>babelo</u>	insulta priskribo pro flaseco de io - Kol
<u>absurdulo</u>	kontraŭ homo pro strangeco	<u>babel-turo</u>	insulta priskribo pro flaseco de io - Kol
<u>acida</u>	insulta adjektivo pro malsimpatia kritikema karaktero *	<u>babilema</u>	insulta adjektivo pro troa parolemo *
<u>acidiino</u>	kontraŭ virino pro kritikema karaktero	<u>babilulo</u>	kontraŭ homo pro troa parolemo *
<u>aĉa</u>	insulta adjektivo pro ĝenerale malbonaj ecoj *	<u>balanulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco *
<u>aĉaĵo</u>	insulta priskribo pro naŭzaj ecoj de io *	<u>banala</u>	insulta adjektivo pro banaeco, signifeco *
<u>aĉulo</u>	kontraŭ homo pro fizika aŭ moralaj malboneco *	<u>banajulo</u>	kontraŭ homo pro banaeco, signifeco *
<u>afekta</u>	insulta adjektivo pro afektemo	<u>bandito</u>	kontraŭ homo pro rabemo, eksterleĝaj agoj *
<u>afekti</u>	agi en nenatura maniero, pozii	<u>barbara</u>	insulta adjektivo pro nerafiniteco, krueleco *
<u>afektulo</u>	kontraŭ homo pro vantemo, aplombo	<u>barbaro</u>	kontraŭ homo pro nerafiniteco, krueleco *
<u>alkoholulo</u>	kontraŭ homo pro troa uzado de alkoholaĵoj, stulteco *	<u>bastarda</u>	insulta adjektivo pro morale malbonaj ecoj *
<u>analfabeta</u>	insulta adjektivo pro malklereco, stulteco *	<u>bastardo</u>	kontraŭ homo pro fienco *
<u>analfabeto</u>	kontraŭ homo pro malklereco *	<u>besta</u>	insulta adjektivo pro krueleco *
<u>anarĥia</u>	insulta adjektivo pro senordeco	<u>besto</u>	kontraŭ homo pro krudeco, malklereco, stulteco *
<u>anarĥio</u>	insulta priskribo de flasa situacio - Kol	<u>bigoto</u>	kontraŭ homo pro dogmececo, tro fervora religieco *
<u>apaĉo</u>	kontraŭ homo pro enurba banditeco, primitiveco	<u>bird-timigilo</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco, tedemo, malbelega aspekto - AA *
<u>aplomba</u>	insulta adjektivo pro troa memfido, arogantececo *	<u>biago</u>	insulta priskribo de alies aserto *
<u>aplombulo</u>	kontraŭ homo pro troa memfido, arogantececo *	<u>biagulo</u>	kontraŭ homo pro ŝercaj mensogoj *
<u>aroganta</u>	insulta adjektivo pro troa memfido, subtaksado de aliaj *	<u>blekulo</u>	kontraŭ homo pro besteca kriado, malbela parolado *
<u>arogantulo</u>	kontraŭ homo pro troa memfido, subtaksado de aliaj *	<u>blinkenbergo</u>	kontraŭ homo pro kontraŭesperantisteco - Kol
<u>avara</u>	insulta adjektivo pro troa ŝparemo *	<u>bofrontido</u>	kontraŭ homo pro perfidemo - MH
		<u>bordelo</u>	insulta priskribo de flasa situacio *
		<u>brasiko</u>	insulta priskribo de homa kapo - Kol

INSULTOJ

<u>bruta</u>	ĝenerala insulta adjektivo -Kol *	<u>eksa</u>	insulta adjektivo pro eksmodeco, maljuneco
<u>bruto</u>	kontraŭ homo pro krueleco *	<u>eksmalliberulo</u>	kontraŭ homo pro rabista konduto
<u>bufono</u>	vidu "ĉarlatano", "ĵonglisto"	<u>eksploatisto</u>	kontraŭ homo pro malhonesta konduto *
<u>bugren!</u>	insulta invito foriri - Sal	<u>eksulo</u>	kontraŭ homo pro eksmodeco *
<u>bugriĝen!</u>	insulta invito foriri - Sal	<u>elefanto</u>	kontraŭ homo pro mallerteco - IS15 *
<u>burĝo</u>	kontraŭ homo pro burĝeco, konservativeco - MH	<u>eluzita</u>	insulta adjektivo pro eksmodeco, malnoveco
<u>ĉantaĝa</u>	insulta adjektivo pro malhonesta agmaniero - AA *	<u>estu fikota!</u>	insulta invito foriri
<u>ĉantaĝisto</u>	kontraŭ homo pro malhonesteco *	<u>estu mortigota!</u>	insulta invito foriri
<u>ĉarlatano</u>	kontraŭ homo pro trompado de la publiko *	<u>et-cerba</u>	insulta adjektivo pro stulteco - Will *
<u>ĉiesulino</u>	kontraŭ virino pro malmorala konduto *	<u>et-cerbulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - Will *
<u>ĉifonulo</u>	kontraŭ homo pro malriĉeco	<u>et-ingulino</u>	kontraŭ virino pro prudeco - Ko56
<u>ĉikanisto</u>	kontraŭ homo pro maljustaj ĝenoj al aliaj *	<u>et-kapa</u>	insulta adjektivo pro stulteco - Will
<u>ĉugo</u>	kontraŭ policisto pro fieco - Weid *	<u>et-kapulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - Will
<u>damna</u>	adjektivo uzebla por plifortigi sakrojn kaj insultojn *	<u>et-mensa</u>	insulta adjektivo pro stulteco - AA
<u>damninda</u>	adjektivo uzebla por plifortigi sakrojn kaj insultojn *	<u>fajromaniulo</u>	kontraŭ homo pro manio ekbruligi fajrojn *
<u>degenera</u>	insulta adjektivo pro malmoralaj ecoj *	<u>falokrato</u>	kontraŭ viro pro kontraŭina konduto *
<u>delira</u>	insulta adjektivo pro frenezeco, stulteco *	<u>fanfaronulo</u>	kontraŭ homo pro stulta vantemo *
<u>demagogo</u>	kontraŭ homo pro ekspluatado de publikaj pasloj *	<u>faŝisto</u>	kontraŭ homo pro reakciaj politikaj ideoj *
<u>demona</u>	insulta adjektivo pro maliceco	<u>fatrasa</u>	insulta adjektivo pro senvaloreco *
<u>demono</u>	kontraŭ homo pro malica karaktero *	<u>fatraso</u>	insulta priskribo de fiaosa aĵaro *
<u>diabia</u>	insulta adjektivo pro maliceco	<u>feĉo</u>	kontraŭ hom(grupo) aŭ pri io plej malestiminda *
<u>diablo</u>	kontraŭ homo pro malica karaktero *	<u>feka</u>	insulta adjektivo pro senvaloreco, abomenindeco *
<u>dik-kapa</u>	insulta adjektivo pro stulteco *	<u>feken!</u>	insulta invito foriri - Sal *
<u>dissaltu!</u>	insulta invito foriri	<u>fekero</u>	kontraŭ homo pro stulteco - Sal
<u>dormemulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco, malrapida reageco *	<u>fekfikanto</u>	kontraŭ homo pro aktiva sodomio - ChLa
<u>drinkulo</u>	kontraŭ homo pro ebriceco, obtuzeco *	<u>fek-lekulo</u>	kontraŭ homo pro ĉeneco, flatemo, stulteco - LePu *
<u>drogulo</u>	kontraŭ homo pro drog-uzo, obtuzeco *	<u>fekulo</u>	kontraŭ homo pro fieco aŭ stulteco - IS15 *
<u>ebria</u>	insulta adjektivo pro drinkemo, nekompreno *	<u>fermu vian faŭkon!</u>	insulta invito ĉesi paroli - LePu *
<u>ebriisto</u>	kontraŭ homo pro kutima drinkemo, nekompreno	<u>fetora</u>	insulta adjektivo pro naŭzaj fizikaj aŭ moralaj ecoj *
<u>ebriulo</u>	kontraŭ homo pro drinkemo, nekompreno *	<u>fetoruilo</u>	kontraŭ homo pro fizike aŭ morale naŭzaj ecoj



<u>fia</u>	insulta adjektivo pro abomenindeco *	<u>fuŝulo</u>	kontraŭ homo pro malkapablo *
<u>fiaĉulo</u>	kontraŭ homo pro fieco fizika kaj morala *	<u>galimatio</u>	insulta priskribo de stulta parolado - Kol
<u>fiaĵo</u>	insulta priskribo de abomeninda aĵo - Kol *	<u>gangstero</u>	kontraŭ homo pro rabista, malhonesta konduto *
<u>fi-bruto</u>	kontraŭ homo pro fizike kaj morale abomeninda konduto	<u>ĝenulo</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco - MH *
<u>fi-homo</u>	kontraŭ homo pro morale abomeninda konduto	<u>haladza</u>	insulta adjektivo pro malbonaodoro, forpuŝeco *
<u>fika</u>	insulta adjektivo pro abomenindeco *	<u>haladzo</u>	insulta priskribo de io malbonodora *
<u>fikita</u>	insulta adjektivo pro fieco - Kol	<u>haladzulo</u>	kontraŭ homo pro malbonaodoro, ĉifoneco *
<u>fik-klaŭno</u>	kontraŭ homo pro stulteteco, amoremo - Lorj	<u>harfendemulo</u>	kontraŭ homo pro pedanteco - MH
<u>fikulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - Kol	<u>harfendema</u>	insulta adjektivo pro pedanteco - MH
<u>filertulo</u>	kontraŭ homo pro trompemo - Kol	<u>harfendisto</u>	kontraŭ homo pro pedanteco - MH
<u>flparigisto</u>	kontraŭ homo pro am-maklerado, flatemo	<u>hipokrita</u>	insulta adjektivo pro ŝajnigo de neposedataj ecoj *
<u>fiulo</u>	kontraŭ homo pro fia konduto *	<u>hipokritulo</u>	kontraŭ homo pro ŝajnigo de neposedataj ecoj *
<u>flatemulo</u>	kontraŭ homo pro troa laŭdado al aliaj *	<u>histeria</u>	insulta adjektivo pro troa ekscitiĝemo *
<u>flatisto</u>	kontraŭ homo pro troa laŭdado al aliaj *	<u>histeriulo</u>	kontraŭ homo pro troa ekscitiĝemo *
<u>fojnkapulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - IS15 *	<u>histrikinio</u>	kontraŭ virino pro malfacila karaktero
<u>for la manaĉojn!</u>	insulta invito ne tuŝi iun aŭ ion - LePu	<u>hontinda</u>	ĝenerala insulta adjektivo pro kaŝindaj ecoj *
<u>forbalau vin!</u>	insulta invito foriri - Kol	<u>huligano</u>	kontraŭ homo pro kontraŭsocia konduto
<u>forfikiĝu</u>	insulta invito foriri - IS15 *	<u>hundaĉo</u>	kontraŭ homo pro fieco - So *
<u>forfiku!</u>	insulta invito foriri - And *	<u>hundinido</u>	kontraŭ homo pro fieco - IS15 *
<u>forfurzu!</u>	insulta invito foriri - SMG	<u>hundino</u>	kontraŭ virino pro fieco *
<u>forpisul!</u>	insulta invito foriri - And	<u>ĥaoso</u>	insulta priskribo de malorda situacio *
<u>forpuŝa</u>	insulta adjektivo pro fizika abomenindeco - Kol	<u>idiota</u>	insulta adjektivo pro malsaĝego *
<u>forvaporigu!</u>	milda insulta invito foriri - IS15 *	<u>idiotio</u>	kontraŭ homo pro stultegeco *
<u>freneza</u>	insulta adjektivo pro neracio *	<u>intriganto</u>	kontraŭ homo pro intrigemo *
<u>frenezejo</u>	vidu "frenezulejo"	<u>intrigema</u>	insulta adjektivo pro ruza aranĝado por (mal)sukcesigi ion *
<u>frenezulejo</u>	insulta priskribo de ĥaosa situacio *	<u>iru al la diablo!</u>	insulta invito foriri *
<u>frenezulo</u>	kontraŭ homo pro neracio *	<u>iru al la infero!</u>	insulta invito foriri *
<u>fridpisulo</u>	kontraŭ homo pro seksa impotenco, frigideco - Sai *	<u>iru feki!</u>	insulta invito foriri - Sai *
<u>fripono</u>	kontraŭ homo pro ruza trompemo, malico *	<u>iru fiki!</u>	insulta invito foriri
<u>furzulo</u>	kontraŭ homo pro sensignifeco	<u>judaso</u>	kontraŭ homo pro perfidemo
<u>fuŝ-azeno</u>	kontraŭ homo pro stulteco, sentaŭgeco - LePu	<u>jonglisto</u>	kontraŭ homo pro lerta evitado de problemoj
<u>fuŝnaskito</u>	kontraŭ homo pro stulteco, fieco - Sai		

<u>kacaĵo</u>	insulta priskribo de stulta ago - Kol	<u>kruda</u>	insulta adjektivo pro primitiveco, nerafiniteco *
<u>kace</u>	malbone - Kol	<u>krudulo</u>	kontraŭ homo pro primitiveco, nerafiniteco *
<u>kaceni!</u>	insulta invito foriri - Kol	<u>kruela</u>	insulta adjektivo pro emo suferigi aliajn homojn
<u>kacokrato</u>	vidu "falokrato"	<u>kukolino</u>	kontraŭ virino pro stulteco
<u>kac-stulta</u>	insulta adjektivo pro troa stulteco - Sal	<u>la diablo prenu vin!</u>	insulta invito foriri
<u>kac-suĉulo</u>	kontraŭ homo pro abomenindeco - SMG	<u>lakeo</u>	kontraŭ homo pro servemo, flatemo
<u>kac-ulo</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco, stulteco *	<u>laŭso</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco - IS15
<u>kamelo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - MH	<u>lupa</u>	insulta adjektivo pro krueleco - Kol
<u>kampulo</u>	kontraŭ homo pro nerafiniteco, naiva konduto	<u>mafio</u>	insulta priskribo de sinsubtenanta grupo *
<u>kanajla</u>	insulta adjektivo pro friponeco	<u>maficulo</u>	kontraŭ homo pro mafieca sinteno *
<u>kanajlo</u>	kontraŭ homo pro malnobla friponeco *	<u>makjavelo</u>	kontraŭ homo pro granda ruzo - Kol
<u>kanibala</u>	insulta adjektivo pro praeco, krueleco - Kol	<u>malaminda</u>	ĝenerala insulta adjektivo *
<u>kastrito</u>	kontraŭ homo pro senpoveco	<u>malbela</u>	ĝenerala insulta adjektivo pro neplaĉaj ecoj *
<u>klaĉa</u>	insulta adjektivo pro kalumni-disvastigado *	<u>malbeninda</u>	ĝenerala insulta adjektivo *
<u>klaĉemulo</u>	kontraŭ homo pro disbabilado pri aliaj homoj *	<u>malbenita</u>	ĝenerala insulta adjektivo *
<u>klaŭno</u>	kontraŭ homo pro malseriozeco *	<u>malbona</u>	ĝenerala insulta adjektivo pro neplaĉaj ecoj *
<u>knabaĉo</u>	kontraŭ homo pro knabece malbona konduto *	<u>malbonmora</u>	insulta adjektivo pro morale malbona konduto
<u>kojonulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - Lorj	<u>malbonodora</u>	insulta adjektivo pro fizike malplaĉaj, forpuŝaj ecoj *
<u>kojon-rompanto</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco - MH	<u>malbonŝandonanto</u>	kontraŭ homo pro kaŭzado de malbonaĵoj al aliaj homoj *
<u>kokin-cerba</u>	insulta adjektivo pro stulteco - Will	<u>malbonulo</u>	kontraŭ homo pro malica konduto *
<u>kokrito</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco - IS15 *	<u>maldeca</u>	insulta adjektivo pro kontraŭeco al akceptebla konduto *
<u>konfuza</u>	insulta adjektivo pro senordeco	<u>maldeculo</u>	kontraŭ homo pro maldeca konduto *
<u>konfuzita</u>	insulta adjektivo pro senordigiteco	<u>malestiminda</u>	ĝenerale insulta adjektivo pro neaprobindaj ecoj *
<u>konfuzo</u>	insulta priskribo de senorda situacio	<u>malestimindulo</u>	kontraŭ homo pro malplaĉaj agoj *
<u>korn-bovo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - IS15	<u>malglata</u>	insulta adjektivo pro malhelpeco - Kol
<u>koruptita</u>	insulta adjektivo pro abomenindeco	<u>malĝentila</u>	insulta adjektivo pro malafableco *
<u>koŝmara</u>	insulta adjektivo pro laceco, ĝeneco	<u>malhonesta</u>	insulta adjektivo pro nekonformeco al honoro, virto *
<u>koto</u>	insulta priskribo de aĉaĵo - Kol	<u>malhonestulo</u>	kontraŭ homo pro malhonesteco *
<u>kotulino</u>	kontraŭ virino pro malpureco, prostituiteco - LePu	<u>malhonorinda</u>	insulta adjektivo pro malnobleco
<u>kraĉa</u>	insulta adjektivo pro abomenindeco - Kol	<u>malica</u>	insulta adjektivo pro konscia malbonfarado *
<u>kretena</u>	insulta adjektivo pro stulteco *		
<u>kreteno</u>	kontraŭ homo pro stulteco - IS15 *		
<u>kret-kapa</u>	insulta adjektivo pro stulteco - Boul		
<u>krimulo</u>	kontraŭ homo pro grava malobservado de leĝoj *		

<u>maliculo</u>	kontraŭ homo pro maliceco *	<u>menŝo</u>	kontraŭ homo pro ties ĝeneco, foje en pozitiva senco - Ŝimo *
<u>malinteligenta</u>	insulta adjektivo pro stulteco *	<u>merdo!</u>	vidu "fekaĵo!"
<u>maljuna fraŭlino</u>	kontraŭ virino pro needzineco, malafabla karaktero	<u>merdulo</u>	vidu "fekulo"
<u>mallaborema</u>	insulta adjektivo pro pigreco *	<u>midzanto</u>	kontraŭ homo pro stulteco
<u>mallaboremulo</u>	kontraŭ homo pro pigreco *	<u>miŝa</u>	insulta adjektivo pro malboneco, malbeleco, maltaŭgeco
<u>mallertulo</u>	kontraŭ homo pro malkapablo - Kol	<u>misfortunjetisto</u>	vidu "malbonŝanconanto"
<u>malmoikora</u>	insulta adjektivo pro krueleco - Kol	<u>miŝhomo</u>	kontraŭ homo pro ĝenerale malbonaj fizikaj aŭ moralaj ecoj
<u>malmoinkuka</u>	insulta adjektivo pro obstineco	<u>miŝulo</u>	kontraŭ homo pro ĝenerale malbonaj fizikaj aŭ moralaj ecoj
<u>malnobla</u>	insulta adjektivo pro malaltaj moralaj ecoj - Kol	<u>mizera</u>	insulta adjektivo pro granda malriĉeco aŭ malfeliĉo *
<u>malnobiulo</u>	kontraŭ homo pro malnobleco	<u>mizerulo</u>	kontraŭ homo pro mizereco *
<u>malnorma</u>	insulta adjektivo pri deviado, strangeco	<u>molaĉa</u>	insulta adjektivo pro neefikeco, dikeco, malkuraĝo *
<u>malnormala</u>	insulta adjektivo pri strangeco *	<u>molaĉulo</u>	kontraŭ homo pro dikeco, nedecidemo, malkuraĝo
<u>malordo</u>	insulta priskribo de senorda situacio - Kol *	<u>mond-fino</u>	insulta priskribo de ĥaosa situacio - Kol
<u>malprudenta</u>	insulta adjektivo pro stulteco, naiveco *	<u>monstro</u>	kontraŭ homo pro malbeleco, krueleco *
<u>malpura</u>	ĝenerala insulta adjektivo *	<u>moruo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - IS15 *
<u>malŝaĝulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco *	<u>munio</u>	kontraŭ homo pro rigideco, maljuneco *
<u>malsovrulo</u>	kontraŭ homo pro malmodereco - Kol	<u>murda</u>	insulta adjektivo pro krueleco *
<u>malŝprita</u>	insulta adjektivo pro spirita senvigleco - Kol	<u>murdisto</u>	kontraŭ homo pro krueleco, krimeco *
<u>malŝpritulo</u>	kontraŭ homo pro malŝpriteco *	<u>muŝ-bugrulo</u>	kontraŭ homo pro pedanteco aŭ prudeco - Magn *
<u>maltaŭga</u>	insulta adjektivo pro neuzebleco, senutileco - Kol	<u>muŝmidzanto</u>	kontraŭ homo pro pedanteco
<u>malvirta</u>	insulta adjektivo pro malbonfarado *	<u>naivulo</u>	kontraŭ homo pro sensperta malkaŝemo aŭ kredemo *
<u>malvirtulo</u>	kontraŭ homo pro malvirteco *	<u>napokapo</u>	kontraŭ homo pro ties stulteco - Nord *
<u>mania</u>	insulta adjektivo pro forta kaj daŭra inklino al io *	<u>naŭza</u>	insulta adjektivo pro ekstrema malbeleco aŭ malboneco *
<u>maniulo</u>	kontraŭ homo pro manieco *	<u>naŭzulo</u>	kontraŭ homo pro naŭzeco *
<u>marioneto</u>	kontraŭ homo pro malforta karaktero *	<u>nazmukulo</u>	kontraŭ homo pro juneco, sensperteco, malpureco
<u>marodanto</u>	kontraŭ homo pro malgrandaj ŝtelaĵoj aŭ neleĝaj agoj	<u>neandertala</u>	insulta adjektivo pro primitiveco - SMG *
<u>masturbemulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco *	<u>needukita</u>	insulta adjektivo pro nebona konduto *
<u>meĝero</u>	kontraŭ virino pro aĉeco, koleremo	<u>neeltenebla</u>	insulta adjektivo pro ĝeneco de iu aŭ io *
<u>mensoga</u>	insulta adjektivo pro nedirado de vero *		
<u>mensoganto</u>	kontraŭ homo pro dirado de neveraĵoj *		
<u>mensogema</u>	insulta adjektivo pro mensogemo *		
<u>mensogulo</u>	kontraŭ homo pro dirado de neveraĵoj *		
<u>menŝa</u>	insulta adjektivo - vidu "menŝo" *		

<u>neenviinda</u>	insulta adjektivo pro ĝenerala malboneco - Kol	<u>porkino</u>	kontraŭ virino pro abomenindeco - Sai *
<u>ne ĝenu min!</u>	insulta invito foriri aŭ ĉesi paroli *	<u>porko</u>	kontraŭ homo pro manĝemo, malpureco, abomenindeco *
<u>nekapablulo</u>	kontraŭ homo pro netaŭgeco rilate al io farenda *	<u>porna</u>	insulta adjektivo pro troa seks-eco de io
<u>nenormala</u>	insulta adjektivo pro strangeco *	<u>pornulo</u>	kontraŭ homo pro emo al seksumado
<u>nenormalulo</u>	kontraŭ homo pro nenormaleco *	<u>poŝo-ŝtelisto</u>	kontraŭ homo pro malgrandaj krimoj
<u>nescianto</u>	kontraŭ homo pro nekulturiteco, needukiteco, neinformiteco *	<u>proksimpisulo</u>	kontraŭ homo pro stulteco - IS15 *
<u>netolerebla</u>	insulta adjektivo pro neeltenebleco, neallasebleco *	<u>provokanto</u>	kontraŭ homo pro incitado de aliaj homoj *
<u>nit-manka</u>	insulta adjektivo pro stulteco - Kol	<u>provokisto</u>	kontraŭ homo pro profesia incitado de aliaj homoj *
<u>nula</u>	insulta adjektivo pro sensignifeco, senvaloreco	<u>publikulino</u>	kontraŭ virino pro prostituiteco
<u>obseda</u>	insulta adjektivo pro prema okupado de ies spirito *	<u>pug-fikanto</u>	kontraŭ homo pro stulteco - IS15
<u>obsedato</u>	kontraŭ homo pro manio *	<u>pug-fikita</u>	insulta adjektivo pro stulteco, malkapablo
<u>obstina</u>	insulta adjektivo pro firma restado ĉe sia opinio *	<u>pug-lekanto</u>	kontraŭ homo pro flatemo - IS15 *
<u>obstinulo</u>	kontraŭ homo pro obstineco *	<u>pug-mieno</u>	kontraŭ homo pro malsimpatia karaktero
<u>obtuza</u>	insulta adjektivo pro neprecizeco, malklareco *	<u>pug-truo</u>	kontraŭ homo pro stulteco kaj fieco - IS15 *
<u>obtuzulo</u>	kontraŭ homo pro obtuzeco, nekompreno *	<u>pulo</u>	kontraŭ homo pro samseksemo - LKK 15/23 *
<u>palpisto</u>	kontraŭ homo pro emo palpi aliajn homojn *	<u>pupo</u>	kontraŭ homo pro ŝanĝigebla karaktero *
<u>parazita</u>	insulta adjektivo pro neni-farado, ekspluatado de aliaj *	<u>putinido</u>	kontraŭ homo pro fieco - IS15 *
<u>parazito</u>	kontraŭ homo pro paraziteco *	<u>putra</u>	insulta adjektivo pro malboneco, ekseco *
<u>patrin-bugristo</u>	kontraŭ homo pro fieco - IS15	<u>putru for!</u>	insulta invito foriri - IS15
<u>patrin-fikanto</u>	kontraŭ homo pro fieco - IS15	<u>rabisto</u>	kontraŭ homo pro krimaj agoj *
<u>patrin-fikulo</u>	kontraŭ homo pro abomenindeco - SMG	<u>rasisto</u>	kontraŭ homo pro malica konduto al alispecaj homoj *
<u>pediko</u>	kontraŭ homo pro paraziteco	<u>rato</u>	kontraŭ homo pro fieco - IS15
<u>perfidulo</u>	kontraŭ homo pro perfidemo, nefidindeco *	<u>renegato</u>	kontraŭ homo pro opini-ŝanĝemo
<u>perforta</u>	insulta adjektivo pro uzado de forto fizika aŭ spirita *	<u>repuŝa</u>	insulta adjektivo pro malbonaj fizikaj aŭ moralaj ecoj *
<u>perfortulo</u>	kontraŭ homo pro emo perfortadi *	<u>ridinda</u>	insulta adjektivo pro stulteco de io *
<u>pesta</u>	insulta adjektivo pro granda danĝereco aŭ ĝeneco *	<u>ridindulo</u>	kontraŭ homo pro fizike aŭ morale malbonaj ecoj aŭ agoj *
<u>pestulo</u>	kontraŭ homo pro ĝeneco *	<u>rubo</u>	insulta priskribo de io senvalora, senorda *
<u>piĉen!</u>	insulta invito foriri - Kol	<u>rubujo</u>	insulta priskribo de io senorda aŭ senvalora
<u>pirato</u>	kontraŭ homo pro krimaj agoj	<u>ruliĝu!</u>	insulta invito foriri - Kol
<u>porkaĵo</u>	insulta priskribo de malbona ago aŭ aĵo - Kol		

<u>ruzulo</u>	kontraŭ homo pro ruza elturniĝemo - Kol	<u>subaĉetato</u>	kontraŭ homo pro korupciĝemo *
